

Meven, plu Meven, ĉu vi konas ? Interkant', Interkant' plu.... ? Jes eble...

Interkant' estas kvazaŭ sekvo de Meven kaj plu Meven.

Meven estas bretona esperanta koruso, ĝi naskiĝis en 1996, sub gvidado de Franjo Lévêque. Meven registris du Kdojn : "Meven" (bretonaj kantoj) kaj "plu Meven" (maristaj kantoj tra la mondo).

Meven emis grandiĝi ekster bretonio, do kreiĝis la interregiona koruso Interkant' en 2009, plu sub gvidado de Franjo. Interkant' prezentis du verkojn : la "Kanto General" kaj "ĉirkaŭ Karmen".

Franjo anoncis ke ŝi deziras forlasi la gvidadon de Interkant', do alvenas nun Interkant' plu.

Por ekkonstrui Interkant' plu, ni proponas kant-renkontiĝon en Grésillon, de la 8a ĝis 11a de majo 2014.

Zdravka Bojĉeva, alinome nia "Karmen", jam proponis sin por gvidi la koruson ; ja ŝi havas grandan sperton pri korusogvidado.

Ankaŭ Maja Mériaux pretas gvidi kelkajn kantojn, ŝi estas ĥorestrino en sia regiono. La deziro de Zdravka kaj Maja estas komuna laboro. Eble aliaj profesiaj ĥorestroj ŝatus kuniĝi kun ili.

Tiu renkontiĝo havas plurajn celojn :

- kunigi ĉiujn kantemulojn, interalie la korusanojn de Interkant', sed ne nur, ĉar nun ne sufiĉas la fortoj de Interkant'.
- kunigi ĉiujn homojn kiuj havas ideojn kaj emojn, kaj pretas proponi aŭ kunlabori.
- plezurigi sin per kantado.
- projekti kaj ekkonstrui novan programon, multe pli facila ol la antaŭaj. Zdravka kaj Maja jam havas kelkajn ideojn. Ja kanto estu bazo, sed povas enmiksiĝi teatrumado.

Ne necesas esti spertulo pri kantado por partopreni, necesas nur emon kanti en Esperanto.

Pri preciza organizo, materiala kaj kantada, ni informos poste. Sed por faciligi la organizadon ni petas al ĉiuj anonci sian intencon per antaŭ-aliĝon (sen tuja engaĝiĝo).

Ĉar tiu renkontiĝo povos okazi nur se sufiĉas la partoprenontoj, ni petas ankaŭ ke vi diskonigu, varbu, propagandu pri tiu aranĝo, en viaj kluboj, sur viaj retaj listoj, ktp.

Manjo Clopeau, kaj la skipo de Interkant'
Respondo al manjo.clopeau@gmail.com